

# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

Jarkolekto 31 - n-ro 1



Januaro - Februaro 2026

## Memore al Rob Moerbeek 6

### Nederlando

Aktivaĵoj de La  
Amsterdama Rondo

10

### Nederlando

Raporto pri la  
junulara KKPS 2025

11

### Libroj

Recenzo: *Ombro sur  
interna pejzaĝo*

18

# Fenikso

Revuo de  
Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland

ISSN 1384 - 6515



Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton. La jara kotizo en 2026 estas €41,50 por membroj pli ol 30-jaraj, €20,- por membroj ĝis 30-jaraj kaj €15,- por samhejmano.

## Kunlaborantoj de Fenikso

**Ĉefredaktoro:** Paweł Fischer-Kotowski

**Redaktoroj:** Thijs van Viegen, Paweł Fischer-Kotowski

**Korektantoj:** Bert de Wit, Inge Demmendaal

Limdato: Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis **la 28-a de februaro 2026**.

## Informoj pri Esperanto

Ineke Emmelkamp

📍 Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

✉ [info@esperanto-nederland.nl](mailto:info@esperanto-nederland.nl)

☎ 050 571 88 42

## Studosemajnfino/studieweekend

✉ [studosemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajnfino@esperanto-nederland.nl)

## Esperanto Nederland enrete

🌐 <https://www.esperanto-nederland.nl>

📘 <https://facebook.com/esperanto.nederland>

📌 <https://t.me/EsperantoNederland>

## Sendu viajn kontribuojn al

✉ [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)

Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.

La redakcio decidas pri la publikigo de la tekstoj.

## Estraro

✉ [estraro@esperanto-nederland.nl](mailto:estraro@esperanto-nederland.nl)

**Prezidanto:** Marc van Oostendorp

Nederlandse Taal en Cultuur

Radboud Universiteit Nijmegen

📍 Postbus 9103, 6500 HD Nijmegen

✉ [prezidanto@esperanto-nederland.nl](mailto:prezidanto@esperanto-nederland.nl)

**Sekretario:** Rob Groeneveld

📍 Scharounlijn 44, 2728 BT Zoetermeer

☎ 06 19 77 35 27

✉ [sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl)

**Kasisto:** Kees Neeft

📍 Van Alphenplein 84, 2353 CN Leiderdorp

✉ [kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl)

**Estrarano:** Peter van Noorden

📍 Tamarixplantsoen 203, 1702 JD Heerhugowaard

✉ [petervn@esperanto-nederland.nl](mailto:petervn@esperanto-nederland.nl)

☎ 06 22 61 32 49

**Estrarano:** Ineke Emmelkamp

📍 Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

✉ [informado@esperanto-nederland.nl](mailto:informado@esperanto-nederland.nl)

**Membro-administranto:** Koos Scharroo

📍 Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord

✉ [membroj@esperanto-nederland.nl](mailto:membroj@esperanto-nederland.nl)

☎ 06 22 41 32 67

Ekz. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero ktp.

## Pri sociaj komunikiloj

✉ [sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl](mailto:sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)

## Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67

Nome de Esperanto Nederland

## Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie

📍 Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord

# En la numero

## Nederlando

Forpasis Rob Moerbeek, vivanta institucio  
Studsemajnfino: perfekta okazo por lerni la lingvon  
Aktivaĵoj de La Amsterdama Rondo en 2025  
Biterbuloj, koncertoj kaj Sinterklaas en KKPS  
Protokolo de la 34-a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland  
Tagordo por la 35-a ĝenerala kunveno

## Nekrologoj

### Ceteraĵoj

Libroj  
Revuo-interŝanĝo  
Kien iris atestanto?  
Enigmo

5

6

9

10

11

12

16

17

18

18

20

21

22

# Voorwoord

Dit is alweer de eerste *Fenikso* van 2026. De jaarwisseling ligt alweer even achter ons, maar ook wij wensen iedereen nog een gelukkig 2026 toe. Een nieuwjaarsgroet van onze voorzitter Marc van Oostendorp vind je op **pagina 5**.

In deze *Fenikso* staan we stil bij het overlijden van Rob Moerbeek op 27 november 2025. In het vorige nummer meldten we dit al, maar omdat hij een belangrijke rol speelde voor Esperanto, besteden we in dit nummer van *Fenikso* meer aandacht aan zijn overlijden. Op **pagina's 6 en 7** vind je een in memoriam, en op **pagina 8** vind je twee korte persoonlijke over Rob. Rob zelf schreef ook een afscheidswoord, dat je ook op **pagina 8** vindt.

Afgelopen najaar vond het studieweekend in Krikkenhaar weer plaats. Ron Winteraeken ging erheen en schreef het artikel dat je op **pagina 9** kunt vinden. Een overzicht van de activiteiten van *La Amsterdama Rondo* staat op **pagina 10**. Ook vond KKPS weer plaats, georganiseerd door NEJ (Nederlandse Esperanto Jongeren). Zie **pagina 11**.

Net als in het eerste nummer van vorig jaar, vind je in deze *Fenikso* het verslag van de algemene vergadering van Esperanto Nederland, op **pagina 12**. De algemene vergadering van dit jaar is op 11 april in Utrecht. Kijk op **pagina 16** voor meer informatie en de agenda voor de vergadering.

Niet alleen Rob Moerbeek is overleden. Op pagina 17 vind je ook overlijdensberichten van Titus Krijgsman en Ed Borsboom. Beide verliezen gaan ons aan het hart.

Onder *Ceteraĵoj* vind je in dit nummer recensies van boeken (**pagina 18**), de *Revuo-interŝanĝo*, een educatieve tekst van Harm Voortman (**pagina 21**), een woordzoeker (**pagina 22**) en *La Komencinto* (**pagina 23**). Op 7 juni kun je meedoen aan een wad-excursie met andere esperantisten (**pagina 23**). Het komende studieweekend vindt met Pinksteren plaats. Zie het achterblad voor meer informatie.

*Paweł en Thijs*




11



9



10



20

## Sur la kovrilpaĝo

Bildo: Robin van der Vliet

Sur la kovrilpaĝo troviĝas foto pri Rob Moerbeek en la 104-a UK (2019). Li forpasis novembron lastjare, kaj en ĉi tiu *Fenikso* ni rememoras lin – kiu li estis kaj kion li signifis por la Esperanta movado. Vidu sur **paĝoj 6–7**. Sur paĝo 8 vi trovos ankaŭ personajn rememorojn de liaj kolegoj el la CO kaj la letero kiun Rob verkis al la posteuloj (**paĝo 8**).

# De la estraro

La estraro kunvenis la 13-an de januaro 2026.

La dato de la Kultura Tago en Veghel estas nun konata: sabato, la 13-a de junio 2026. Ĝi okazos en belega loko kaj inkluzivos viziton ĉe fabriko de ĉokolado kaj mallongan promenon en natura areo. En la retejo jam aperis foto pri Veghel.

Ni renkontis dum la studosemajnfino 87-jaran sinjoron, kiu kunportis albumon de sia patrino kun kartoj el la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento. Ni planas transdoni la albumon al la arĥivejo IISG (Internacia Instituto por Socia Historio), kiu havas la arĥivon de Esperanto Nederland. Ni akiris ankaŭ aron da kartoj senditaj al H.J. Bulthuis en Hago ekde 1905.

La dua studosemajnfino en 2026 okazos de la 6-a ĝis la 8-a de novembro en Krikkenhaar.

Ineke Emmelkamp sendis librojn el la kolekto de C.B. Zondervan al la Reĝa Biblioteko (KB). Alian skatolon kun faldfolioj, insignoj, glumarkoj k.s. ŝi sendis al la arĥivo IEspA en Diest, Belgio.

La konto de Esperanto Nederland ĉe X (antaŭe: Tvitero) estas nuligita.

La estraro preparas la venontan jarkunvenon, kiu okazos sabaton, la 11-an de aprilo 2026 en Utrecht. Interalie la financa jarraporto kaj la agadraporto estos pridiskutataj.

Du estraranoj de la Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto (NGGE) bedaŭrinde forpasis. Ili konservis la arĥivon de NGGE. Ĉar NGGE estas faka sekcio de Esperanto Nederland, nia asocio respondecas pri la arĥivo. Ni serĉas destinon por ĝi.

La estraro decidis kunveni la 10-an de februaro, la 10-an de marto, la 7-an de aprilo, la 5-an de majo kaj la 9-an de junio, ĉiufoje rete. Ĉiu membro kiu volas ĉeesti la estrarkunvenon povas anonci sin ĉe la sekretario.

*Rob Groeneveld*  
sekretario

## Invito al la 35-a jarkunveno

Ĉiuj membroj de Esperanto Nederland estas invitataj al la membrokunveno kiu okazos sabaton, la 11-an de aprilo 2026

**Loko:** De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht

**Tempo:** Alveno ekde la 13h00, la kunveno komenciĝos je la 13h15.

Ĉiu membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

Agadraporto, financaj raporto, buĝeto kaj laborplano aperos en la retejo. Paperajn ekzemplerojn membro povos peti de la sekretario post la 1-a de marto 2026.

**Prelego:** Post la kunveno okazos prelego de Luis Miguel Rojas Berscia, lingvisto kiu regas proksimume 40 lingvojn, inkluzive de Esperanto.

La tagordo de la kunveno troviĝas sur **paĝo 16**.

*Rob Groeneveld*  
sekretario de Esperanto Nederland



Bildo: Alexander ĉe Wikimedia Commons

## *Novjara saluto de la Prezidanto*



Ni vivas en malorda tempo, tempo en kiu la internacia ordo, kia ĝi dum la pasintaj jardekoj sufiĉe firme ekzistis, ŝajnas diseriĝi. Usono, kiu longe estis grava motoro de tiu ordo, retiriĝas el internaciaj organizaĵoj kiel Unuiĝintaj Nacioj. Ĉirkaŭ ni ĉie aŭdiĝas militema lingvaĵo.

Tio estas zorgiga. La idealoj sur kiuj la Esperanto-movado estas konstruita – demokratia internacia komunikado, solvado de problemoj per egala dialogo – troviĝas sub premo. Ĝuste al Unuiĝintaj Nacioj ni dum longa tempo ligis niajn esperojn.

Aliflanke: Esperanto ekde ĝia komenco antaŭ preskaŭ 140 jaroj travivis multajn gravajn krizojn, kaj la antaŭa “usona” ordo ankaŭ ne tute agordis kun niaj idealoj. Kaj ĝuste en tiaj tempoj tiuj idealoj gravas: la konvinko, ke antaŭ ĉio ni ĉiuj estas homoj, kaj ke ekzistas manieroj honeste alfronti nian proksimulon – ne trudante al li nian supozatan superan kulturon, sed starigante neŭtralan platformon, kie ni povas renkontiĝi.

Tio estas grandaj vortoj, kaj Esperanto Nederland estas ne tro granda asocio kun malmulte da povo. Ni povas igi ĉi tiujn ideojn venki nur per kunlaboro: internacie kaj nacie, kun ĉiuj homoj de bona volo. Kaj dumtempe ni povas montri al la mondo, dum niaj kunvenoj kaj en niaj publikaĵoj, ke daŭre ekzistas nia alternativo.

*Marc van Oostendorp*

*Prezidanto de Esperanto Nederland*



Bildo: Edukado.net

## Forpasis Rob Moerbeek, vivanta institucio (1936–2025)

Jaŭde la 27-an de novembro 2025 Rob Moerbeek, unu el la plej konataj vizaĝoj de la internacia Esperanto-movado, forpasis en sia hejmurbo Beverwijk. Rob naskiĝis la 1-an de majo 1936 en socialisma Esperanto-medio – liaj gepatroj, Jan Moerbeek kaj Alida Elisabeth Prins, estis idealismaj laboristoj kiuj ekzerciĝis pri la lingvo dum promenoj, dum juna Rob, tiam gimnaziano, aŭskultis.

Li elektis studi klasikajn lingvojn, instruate de docentoj kiuj inspiris lin pri la malnovgreka, la latina kaj la antikva historio. Dum sia instruista periodo (1963–1969) li aniĝis (1966) al Asocio de Laboristaj Esperantistoj FLE kaj al Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Post somera volontulado li estis dungita en 1969 kiel oficisto en la Centra Oficejo de UEA, de la direktoro Victor Sadler. Dum 32 jaroj li respondecis pri la sendo de libroj kaj revuoj, zorgis pri la kolekto de Biblioteko Hector Hodler kaj pri la arkivo.

Krome li estis konata kiel la ĉefprovleganto de la tuta movado: li korektis interalie la revuojn *Esperanto*, *Monato*,

*Internacia Pedagogia Revuo*, *Scienca Revuo*, *Fenikso*, *Esperantista Vegetarano* kaj *La kontakto* (la revuo de la nederlandaj blindulaj esperantistoj). Lastatempe li kontrollegis ankaŭ *Unesko-Kuriero*. Li estis provleganto ankaŭ por ĉiuj libroj kaj broŝuroj de UEA.

Krom sia oficeja laboro Rob daŭrigis studojn. Li sekvis prelegojn pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo kaj en 1978 estis nomumita speciala docento pri Esperanto. Ĝis 1998 li instruis tie, entuziasmigante generaciojn da nederlandaj studentoj por la internacia lingvo. Kiel instruisto kaj korektisto li havis tre akran okulon por bona lingvouzo; laŭ liaj lernantoj li ne nur rekonis krudajn erarojn, sed ankaŭ klarigis ilin komprenige kaj korektis ilin didaktike.

Rob interkonatiĝis kun sia estonta edzino, Nora Reinders Bartels, kiam ŝi, kiel blindulino, sekvis lian kurson. Kune ili engaĝiĝis por la situacio de blinduloj en la Esperanto-movado. Nora tradukis libron pri Anne Frank; ŝi mortis en 1998. Post tio Rob daŭrigis la laboron: li reprezentis LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) en la komitato de



Bildo: Esperanto Nederland ĉe YouTube

UEA kaj helpis fondi la nederlandan sektion Nosobe. Liaj ligoj kun la blindula komunumo restis ĉefa fadeno tra lia vivo; eĉ liaj kursoj estis ĝustatempe adaptitaj por brajlo.

Rob havis ankaŭ fortan socian engaĝiĝon ekster Esperantujo. Li kampanjis kontraŭ fumado kaj kune kun sia edzino estis aktiva en TADEN, la monda asocio de nefumantaj esperantistoj. Li subtenis pacajn kaj mondfederalismajn iniciatojn, skribis leterojn al oficialuloj de UN kaj aliaj decidofarantoj, kaj organizis kursojn por anoj de la Universala Federacio. En oktobro li ankoraŭ tradukis en Esperanton paroladon de la nederlanda eksministro Jan Pronk pri la situacio en Gazao.

Tra la jaroj Rob tradukis kaj redaktis multajn tekstojn. Inter la plej konataj tradukoj troviĝas la teologia verko *La afero Jesuo kaj la Judoj* de Peter J. Tomson en Esperanton (2000) kaj, inverse, la nederlanda versio de la lernolibro *Esperanto per rekta metodo* (2007).

La sindediĉo de Rob Moerbeek ne restis nerimarkita. En 2000 li ricevis la Premion Deguĉi pro sia longa kontribuo por esperantistoj en evolulandoj kaj por homoj kun handikapoj. Dum la Universala Kongreso en 2011 oni nomumis lin honora membro de UEA kaj tri jarojn poste li fariĝis honora membro ankaŭ de la internacia instruista asocio ILEI.

Kulmino por li venis la 28-an de aprilo 2018: dum la Malferma Tago de la Centra Oficejo la urbestro de Beverwijk alpinglis al li la rubandon kiu faris lin Kavaliro en la Ordeno de Oranje-Nassau. Li ricevis tiun reĝan distingon pro sia longa laboro por la Esperanto-movado, sia subteno al la blindula movado kaj sia redakta kaj instrua agadoj.

Post lia formala emeritiĝo en 2001 Rob plu laboris du tagojn semajne kiel volontulo en la Centra Oficejo – tasko kiun li plenumis ĝis la lasta momento. Lia lasta labortago en la CO estis la 7-a de novembro 2025.

Laŭ kolegoj li restis, spite al aĝo kaj sanproblemoj, daŭre aktiva: li gvidis kursojn, vojaĝis al kongresoj kaj konferencoj, laboris por blindulaj asocioj kaj instruistaj organizaĵoj, kaj estis membro de sennombraj kluboj. La decembra numero de la revuo *Esperanto* (de UEA) estas ankoraŭ korektita de li. Per sia akra rigardo li rimarkis erarojn kiujn aliaj eĉ ne vidis, kaj li preferis labori ol fanfaroni.

Por la nederlanda Esperanto-movado Rob Moerbeek estis vivanta institucio. Li funkciis interalie kiel komisiito por eksteraj kontaktoj. Li ankaŭ kunlaboris pri la brajla biblioteko, konsilis lokajn klubojn kaj reprezentis nederlandajn esperantistojn en internaciaj medioj. Liaj neŝanceblebla sindediĉo al lingva zorgo, instrua kompetento kaj socia justeco formis generaciojn da esperantistoj, en Nederlando kaj la tuta mondo.

Rob Moerbeek montris kion signifas vivo en servo de idealisma projekto. Li kunigis lingvan kompetentecon kun profunda socia engaĝiĝo kaj praktika sindediĉo. Ke li restis fidela al zorgema korektado kaj persona subteno ankaŭ en epoko de novaj komunikiloj, faris lin kvazaŭ modela *samideano*. Lia vivoverko memorigas al ni kiel unusola volontulo povas levi la kvaliton de tutmonda movado. Tio verŝajne estas la plej grava heredaĵo, kiun Rob Moerbeek lasas al ni.

Marc van Oostendorp

Rememoroj pri Rob sur la sekva paĝo >>

## Li posedis Esperanton ĝis la lasta detalo

Rob Moerbeek estis mia kolego en la Centra Oficejo dum 26 jaroj. Ni renkontiĝis en julio 1985, kiam mi venis al la CO, sed niaj UEA-rilataj vivoj komenciĝis pli-malpli samtempe en julio 1969. Tiam Rob eklaboris en la CO kaj helpis en la finaj preparoj por la 54-a UK en Helsinko, mia unua UK. Rob tamen ne partoprenis ĝin, sed mia kongresa dokumentujo estis verŝajne kunmetita de li.

Ni estis samideanoj ne nur pri Esperanto. Jam hejme Rob heredis socialismajn ideojn. Li estis membro de la Laborpartio (PvdA), sed kritikis ĝin, se ĝi ne agis konforme al liaj atendoj kiel pacisto. Li estis ankaŭ mondfederisto kaj redaktis Esperanto-rubrikon por la landa organo de tiu movado.

Rob posedis Esperanton ĝis la lasta detalo kaj mi multe lernis de li. La alta lingva nivelo kaj senerareco de la eldonaĵoj de UEA estis precipe lia merito. En la fina periodo Ionel Oneț dividis kun li tiun respondecon, sed ĉar oni fortranĉis estontecon de la CO, posteuloj por ili bedaŭrinde ne povis kreski.

Ripozu en paco, kara Rob. En miaj memoroj vi ĉiam vivos.

*Osmo Buller*

*Ĉi-sube ni publikigas la adiaŭan leteron postlasitan de Rob.*

### *Karaj posteuloj,*

Mi opinias la morton vere utila kaj natura institucio: la tero ne fariĝu superpeza de ni, bredtaŭroj kaj idriĉaj bovinoj, grandvorantoj sur Nia Patrino Tero. En antaŭaj tempoj militoj kaj pandemioj helpis bremsi nian senbridan plivastigadon, sed de la ekkonsciigo pri ĉiaspecaj homaj, infanaj, bestaj kaj teraj rajtoj, eĉ tiranoj estas formetitaj kiel necivilizitaj kaj neplenkreskaj: ilin oni urĝe (re)kristanigu, sed tiam per humanaj, empatiplenaj Homoj.

Mi bedaŭras ke mi devas seniluziigi multajn: mono apenaŭ estas por malplenigi la domon (libroj → UEA) kaj mi devis surprizi tro multajn taskojn kiuj kompreneble neniam finplenumiĝas.



*Bildo: Revuo Esperanto*

## La homo kiu ne sciis diri ne

- Rob, ĉu vi pretigos teon?
- Jes.
- Ĉu vi pretigos ankaŭ kafon?
- Jes.
- Ĉu dum la kafopaŭzo vi helpos min pri kelkaj lingvaj demandoj?
- Jes.
- Ĉu vi eliros tagmeze por butikumi?
- Mi ne planis, sed se necese mi faros. Kion mi aĉetu por vi?
- Se vi iros butikumi tagmeze, ĉu vi pretas porti pakajeton al la poŝto?
- Certe, jes.

Mi povus daŭrigi ĝistede menciitajn dialogojn, en kiuj la respondo de Rob estis senescepte jesa. Negrave kion mi petis de li, se tio estis home plenumebla, li ĉiam respondis jese. Se io estis farebla, rifuzo ne estis alternativo.

*Ionel Oneț*

Ĉu mi amas (amis) ĉiun? Jes, sed mi ne rajtis min altrudi kun miaj neperfektaj dentaro kaj menso.

Kompreneble mi esperas ke mi povos daŭrigi ankoraŭ iom da tempo (post 2020). Se iu forviŝus larmon, bone, sed ne faru dramon el tio – mi ankaŭ tion ne (plu) faras.

Ĉu mi kredas en postmorta mondo? Estus agrable, sed mi vidas ĝin pli kiel “dezir-pensado” kun ĉiuj kreaĵoj de tio kion ni opinias “ideala”.

Vi ĉiuj fartu bone. Se vi serĉas ion: lernu Esperanton kiel kontraŭpezon kontraŭ la aroganteco de la povo.

*Beverwijk, la 27-an de aŭgusto 2020*

## Studsemajnfino: perfekta okazo por lerni la lingvon



Mia unua renkontiĝo kun aliaj parolantoj de Esperanto okazis en studsemajnfino en Krikkenhaar, en marto 2022. Mi jam sciis pri la ekzisto de la lingvo kaj mi multe legis pri ĝia fascina historio, kiu kaptis mian intereson. Kompreneble, mi volis ankaŭ lerni la lingvon kaj mi intencis aliĝi al la studsemajnfino. Pro la kronviroza pandemio ĝi bedaŭrinde longtempe ne povis okazi, sed kiam ĝi finfine estis anoncita, mi tuj aliĝis!

La studsemajnfino okazis en marto, sed jam en februaro mi komencis mem lerni per kurslibro kiun mi trovis rete, ĉar mi timis ke mi scipovus diri tute nenion en Esperanto. La unua fojo, kiam mi povis diri la vorton "saluton" estis speciala momento. Dum la unua vespero mi sidis ĉe la tablo kun aliaj personoj kun pli-malpli sama aĝo kiel la mia. Ĉiuj estis nederlandanoj, krom unu franco kiu ne parolis la nederlandan, do ne eblis krokodili (tiam mi verŝajne ankoraŭ ne konis tiun vorton!). Mi, do, estis ĵetita en profundan akvon sed mi surpriziĝis, ke mi povas jam sufiĉe multe kompreni. Mi eĉ povis partopreni en la konversacio, kvankam mi ankoraŭ ne sciis multajn vortojn. Mi havas neforgesablajn rememorojn de tiu unua renkontiĝo kaj mi jam plurfoje revenis al Krikkenhaar. La lecionoj estas ĉiam agrablaj kaj oni lernas multe en mallonga tempo, dank' al la lertaj instruistoj.

La lasta fojo estis en novembro 2025. La aŭtuna vetero foje estis iomete griza kaj trista, sed tio tamen tute ne malhelpis la varman etoson de la aranĝo. Estis agrable revidi unu la alian, sed mi ankaŭ ŝatis vidi kelkajn novajn vizaĝojn, kiuj havis – kiel mi antaŭ kelkaj jaroj – sian unuan renkontiĝon kun aliaj parolantoj de Esperanto. Vespere ni ludis tabloludojn, kiel ekzemple la muzikludon "Hitster".

Oni kunportis librojn en aŭ pri Esperanto kaj ĉiu povis elekti ion por si kaj kunporti kontraŭ eta pago. Mi elektis la Esperantan tradukon de la libro *La serĉado de la perfekta lingvo* de Umberto Eco.

Ĉu ni renkontiĝu en iu el la venontaj studsemajnfinoj?

*Ron Winteraeken*



Brokantaj libroj



Serioza laboro dum la leciono



La fama krokodilo de Fransuaz el Belgio. Ĉiuj timas!

## Aktivaĵoj de La Amsterdama Rondo en 2025

La kunvenoj de La Amsterdama Rondo kutime okazas en la dua dimanĉo de la monato, de la 13-a horo ĝis maksimume la 15-a horo. Ili okazas en la hotelo *De Koopermoolen* en Amsterdamo, kiu troviĝas tre proksime al la centra stacidomo (Warmoesstraat 5). Post la kunveno, la ĉeestantoj povas partopreni lunĉon en la apuda restoracio *De Kroonprins*, kies nomo post grava interna ŝanĝo fariĝis *Prince Charming*. La nombro da fizikaj partoprenantoj varias inter 15 (en februaro) kaj 5. Eblas ankaŭ virtuala partopreno – per Zoom – kaj tiel ĉeestas proksimume sama nombro.

Januare okazis lingva kliniko kaj ni parolis pri la planoj por la nova jaro.

En februaro okazis la oficiala lanĉado de la nova retejo de Esperanto Nederland. Prof. Marc van Oostendorp enkondukis la temon kaj Foppe-Klaas Hovinga montris per ekzemploj kion oni povas trovi en la retejo.

En marto ni okazigis kvizon pri transitivaj kaj netransitivaj verboj kaj la "beletran angulon" pri la libro *Inter sudo kaj nordo* de Ferenc Szilágyi, kiun gvidis prof. Federico Gobbo.

En aprilo Leston Buell kaj Federico Gobbo parolis pri artefarita intelekto. Leston pri sia praktika uzado de AI dum verkado de lernolibro pri la araba kaj Federico pri la etikaj konsideroj en la uzado de AI en la universitata edukado.

En majo Ward de Kock plivastigis nian scion pri ekstazilo (XTC/MDMA). Kiel sekretario de la ŝtata komisiono pri MDMA li povis bone informi nin pri la uzo kaj danĝeroj de la drogo. Pro la prezento, eĉ venis informpeto de usona esperantisto kiu volis legi la nederlandlingvan raporton. Tute hazarde, lia nomo estas ankaŭ nederlanddevena.

En junio okazis prezento de Julija Batrakova pri Annie M.G. Schmidt en la kadro de memorigo pri la 750-jara ekzistado de Amsterdamo. Bert de Wit prezentis kvizon pri la 750-jara ekzistado de Amsterdamo, sed ne bone atentis la bildojn.



Komuna manĝo post la decembra kunveno



En la 4-a de decembro, dum la Virtuala Kongreso, li ankoraŭfoje prezentis la saman kvizon, sed ĉi-foje kun bildoj. Por tio li tamen uzis Zoom (senprobleme).

En julio Mariska de Jonge parolis pri sia laboro kun homoj kiuj havas iun formon de aŭtismo. Kiel oni edukas homojn en la mensa sanprizorga sistemo pri aŭtismo. Estis bone preparita prezento kaj kelkaj aldonis siajn proprajn spertojn pri aŭtismo.

Septembre Dennis van der Heijden parolis pri siaj spertoj en la akceptado kaj prizorgado de junaj azilpetintoj en Aerdenhout kaj Heemstede. Li prezentis kvizon pri la landoj de kiuj venas la junuloj.

Oktobre Gabrjele Esposito Guido parolis pri siaj spertoj kiel volontulo de TEJO kaj pri la IJK kiu okazis en Indonezio.

Ĉeestis ankaŭ moskvaj geesperantistoj kiuj post la vizito de la Gebeneluxsa Kongreso volis viziti Amsterdamon kaj Harlemon.

Novembre (la 16-an de novembro) ni parolis pri niaj feriaj spertoj, kiuj estis tre diversaj, de loĝado en alia domo en Leiderdorp, kampado en Germanio ĝis la Universala Kongreso en Brno.

Decembre prof. Federico Gobbo tradicie paroligis nin pri la libroj kiujn ni legis dum la jaro. Iuj parolis pri la ĵus aperinta libro de la forpasinta Roman Dobrzyński. Aliaj parolis pri hungara libro pri vulpeto, pri *Alina* (libro de Julian Modest), pri la belega traduko de *La Bapto de caro Vladimir* kaj pri la germanlingva libro kies intrigo situas en esperantista medio en norda Germanio (*Morta instruisto – bona instruisto*). Per la reto ni aŭdis pri ĉina libro de fama verkisto kiu ankoraŭ bezonas provlegadon de alilandano, pri jida rakonto el Ruslando kaj pri la Hodler-familio el Svislando.

Se vi volas ion prezenti pri iu temo, bonvolu kontakti la respondeculojn: Bert de Wit kaj Peter Ebenau.

*Bert de Wit*

## Biterbuloj, koncertoj kaj Sinterklaas en KKPS

### De Coxse Boerderij

KKPS (Klaĉ-Kunveno Post-Somera) 2025 okazis en *De Coxse Boerderij* en Gemert. La ejo troviĝas iom ekster la vilaĝo, sed homoj kiuj ne povis promeni tiun distancon estis veturigataj per aŭto ornamita per Esperanto-flagoj. La bonetosa, kvankam malvarma, bieno konsistas el du konstruaĵoj kiuj estas aparte lueblaj, taŭge por malgranda kaj granda junularaj kongresoj. Kvankam eksterlandaj gastoj unue timis la manĝojn post la nederlanda IJK, tio rapide ŝanĝiĝis pro la profesia kuirado de Lupo kaj la "biterbuloj" en la trinkejo.



### Bunta programo

Kvankam la evento estis malgranda, aperis tri specialaj gastoj. La unuan vesperon okazis koncerto de la nova muzikgrupo Mezbakita, kun humoraj Esperantlingvaj tekstoj. La postan tagon venis juna, loka kantistino Janne kaj speciala gasto el Hispanio, kiu alportis bongustaĵojn. La pozitivaj reagoj de la spektantoj substrekas la neceson de bunta kultura programo dum kongresoj en la estonteco.

Malgraŭ tio, ke novembra variaĵo anstataŭis la tradician halovenan balon, kelkaj partoprenantoj tamen decidis kostumiĝi.



### Ĝenerala Asembleo

Fine okazis la Ĝenerala Asembleo de Nederlanda Esperanto-Junularo. Dum la pasinta jaro NEJ iĝis multe pli aktiva ol antaŭe, organizante sep ĉeestajn renkontiĝojn. La Ĝenerala Asembleo estis momento por festi tiun atingon kaj rigardi antaŭen. Daŭras la ambicio organizi novajn NEJ-tagojn kaj KKPS 2026. Pri tio ni fidis la nove elektitan estraron, kiu konsistas el:

- Frank van Hertrooij (prezidanto)
- Arnold Averink (sekretario)
- Giulio Dioguardi (kasisto)
- Robin van der Vliet (estrarano)

En KKPS partoprenis 23 homoj el 7 landoj – Belgio, Francio, Germanio, Italio, Luksemburgio, Nederlando kaj Usono.



Feliĉan novan jaron kaj ĝis la venonta renkontiĝo!

*Frank van Hertrooij kaj Giulio Dioguardi*



## Protokolo de la 34-a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland

*Dato: la 10a de majo 2025.*

*Loko: De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht.*

*Tempo planita: ekde la 13:15a horo.*

*Ĉeestis la estraro: Marc van Oostendorp, prezidanto, Rob Groeneveld, sekretario, Loes Demmendaal, kasisto, Ineke Emmelkamp, estrarano, Peter van Noorden, estrarano.*

*Ĉeestis 18 membroj kaj unu gasto.*

*Envenis 8 mandatoj.*

*Prezidis: Marc van Oostendorp.*

*Protokolis: Rob Groeneveld.*

### 1. Malfermo de la ĝenerala kunveno

- La prezidanto malfermis la kunvenon.
- La ĉeestantoj ekstaris kaj honoris la forpasintajn membrojn dum momento da silento:  
S-ino Ans Heijstra-Valkering, S-ino Jorine Captein, S-ro Carel Boerlijst, S-ino Baukje Muizelaar-Borger, S-ro Kees Bos, S-ro Piet Schuil, S-ro Ad Peeraer, S-ro J. De Bock kaj S-ro Franklin Van Zoest
- La voĉdonadon kalkulos Ronaldo Nobel kaj Hidido Velsink

### 2. Fikso de la tagordo

La estraro proponas ŝanĝi la tagordon tiel ke punkto 9.4 antaŭenŝoviĝu al nova punkto 8.4, ĉar ĝi estas propono kiu devas esti traktita kun la aliaj proponoj.

La estraro proponis enmeti novan punkton 9.4 Elekto de membroj de la Arbitracia Komisiono. La Arbitracia Komisiono povas decidi pri konfliktoj ene de la asocio. Du membroj de la Komisiono demisios en 2025. Bonŝance ili ambaŭ pretas esti reelektitaj.

La estraro proponis ŝanĝi la tagordon per tio ke ni unue traktu punkton 13 pri la Verloren van Themaat-premio, post la pritrakto de la tagordo. La premioj ĉeestas. Ili devas forlasi nian kunvenon ĉar ili devos poste hodiaŭ aperi en du koncertoj en Frislando.

La kunveno akceptis la ŝanĝojn de la tagordo.

**Punkto 13 estis traktita ĉi tie** (vidu poste en la protokolo)

### 3. Protokolo de la 33a ĝenerala kunveno

Ne estis rimarkigoj pri la protokolo. La prezidanto dankis Rob Groeneveld, kiu faris ĉi tiun protokolon.

### 4. Envenintaĵoj

Anoncis sian neĉeeston: Anneke Schouten-Buijs, Ralph Schmeits, Johan kaj Jannie van der Hoek, Foppe-Klaas Hovinga, Tonnie van Kessel, Pieter Engwirda (kiu estas grave malsana) kaj Alfonso Pijnacker (en malsanulejo).

### 5. Komunikoj

Ne estis komunikoj.

### 6. Agadraporto pri 2024

Ne estis demandoj aŭ rimarkigoj pri la agadraporto.

### 7. Financa jarraporto pri 2024

#### 7.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono

Mariska de Jonge laŭtlegis la raporton:

#### Kaskontrolo 2024, Esperanto Nederland

Je la 17-a de aprilo 2025 ni kontrolis la financon jarraporton de Esperanto Nederland. Niajn demandojn respondis la estrarano pri financoj, Loes Demmendaal.

Klarigojn vi legas en la financa jarraporto.

Ni konstatas diferencon ĉe la enspezoj de la rezulto 2024 kaŭzita de rondigoj. Ni rekomendis korekti la superrigardon por la jaro 2024 kaj estonte ne uzi rondigojn.

Al la membroj, estantaj en la ĝenerala membro-kunveno ni petas malŝarĝi la estraron.

*Ans Bakker - ten Hagen kaj Mariska de Jonge  
2025-04-17, Capelle aan den IJssel*

#### 7.2. Rezultkonto pri 2024 kun klarigoj

Loes Demmendaal: En la rezultkonto nun la nombroj estas sen rondigoj, do ne plu estas kalkuleraroj. Nia rezulto ĉi-

jare estas pozitiva rezulto, kaj tio longe ne okazis. La planitaj elspezoj estis €16 400 kaj la efektivaj elspezoj estis €10 201,67 kaj tio okazis ĉar la studosemajnfinoj donis pozitivan rezulton. Estis multaj donacoj kaj multaj partoprenantoj en la semajnfinoj. Aldone ni plialtigis la prezojn. Ankaŭ la Kultura Tago liveris pozitivan rezulton. Entute ni havis pozitivan rezulton de €51,86. Ne estis demandoj.

### 7.3. Bilanco je 31-12-2024

En la bilanco vi vidas ke la kapitalo pligrandiĝis per tiu €51,86. Por la katedro ni sukcesis akiri €5054. Ni ricevis lastjare dufoje €1500. Unu donaco estas por nederlandanoj kiuj havas financajn problemojn rilate la studosemajnfinojn kaj la alia helpfonduso estas por kulturaj aktivaĵoj. Ne estis demandoj. La prezidanto petis la kunvenon malŝarĝi la estraron. La kunveno aplaudis.

## 8. Proponoj

### 8.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2026.

La estraro proponas plialtigi la jaran kotizon por membroj per 1,50 eŭroj al 41,50 eŭroj. La kotizoj de samhejmanoj kaj membroj ĝis 30-jaraj restos senŝanĝaj. Por malpliigi eventualan deficiton la estraro proponis plialtigi la kotizon por membroj per la inflacio de septembro 2023 al septembro 2024 de 3,45 procentoj. Tio rezultigas ŝanĝon de 1,50 eŭroj. La kunveno akceptis la proponon.

### 8.2. Buĝeto kaj laborplano 2025 (ŝanĝita) kaj 2026

La antaŭe proponita buĝeto por 2025 enhavis deficiton de €7510. Baze, la estraro decidis ke la studosemajnfinoj kaj la Kultura Tago devas pagi sin mem. Ne necesas ke ili havu profiton, sed ili ne havu deficiton. La nova propono reduktas multajn elspezojn, tiel ke estas antaŭvidita deficiton de €1245. Por la jaro 2026 la propono enhavas deficiton de €1885. Ni ne scias ĉu la junularo bezonas monon. La jara kontribuado por la biblioteko de la Universitato de Amsterdamo (UvA) estos nuligita. Estis demando ĉu la elspezo por la junularo estas necesa, ĉar la junularo ne plu aktivas. La prezidanto respondis ke la junularo reaktivas. Ne estas konate ĉu ili bezonos monon. La estraro ankaŭ proponas reduktion de la sumo pagota al IISG. La donacoj en la buĝeto por 2026 jam estas ricevataj. Arjen-Sjoerd de Vries: kio okazos kiam estos deficiton, ĉar ne sufiĉe da partoprenantoj ĉeestis studosemajnfinojn? Loes Demmendaal: Ni petas vin buĝeti sen deficiton, sed se malgraŭ viaj klopodoj kiel organizantoj estos deficiton, la

asocio pagos.

La prezidanto: certe por ni la studosemajnfinoj estas tre gravaj. Ĉiam eblos ŝanĝi la buĝeton por 2026 se strukture ne venas sufiĉe da partoprenantoj.

Bert de Wit: Utilas memori el la pasinteco ke kiam FLE komencis la studosemajnfinojn en la okdekaj jaroj, venis multaj membroj al FLE per la studosemajnfinoj. Do tio subtenas la argumenton ke oni ne tro postulu, ke ne estu deficiton.

Loes: ni ne postulas nulan saldon, ni buĝetas nulan saldon. Kontraŭ la propono estis du, sindetenoj tri. La resto estis por la propono de la estraro, kiu estis akceptita.

### 8.3. Plano por informado

La estraro ne havas proponon pri informado. Ni laboris por la nova retejo. Se iu havas energion labori pri la plano, kontaktu nin. Ni laboros pri la plano en 2025 kaj 2026.

### 8.4. Ŝanĝo de la Regularo

La estraro proponis ŝanĝi la Regularon (Huishoudelijk Reglement) jene:

“Artikel 26.4. Het bedrag van de prijs wordt jaarlijks vastgesteld als onderdeel van de begroting.”

Post zorga tralaborado de la buĝetoj por 2025 kaj 2026, la estraro konstatis, ke la Verloren van Themaatprijs prenas relative grandan porcion de la membrotizoj, kiu povus esti pli utile uzita aliloke. La premio daŭre ekzistas, sed la sumo estos fiksita en la jara buĝeto.

La kunveno akceptis la proponon.

## 9. Elektoj

### 9.1. Estraro

La prezidanto: La kasisto Loes Demmendaal bedaŭrinde demisias. Ŝi lernis Esperanton antaŭ 60 jaroj. La lingvo kaj la movado estas parto de ŝia vivo. Ŝi okupis diversajn rolojn: ĉe UEA, FLE kaj Esperanto Nederland. La laboro de Loes por nia asocio estas netakseble granda. Dum la lastaj jaroj ŝi plenumis la rolon de kasisto bonege.

Ineke transdonis donacon al Loes. La donaco ne estas por Loes, sed ĝi estas kontribuado al War Child, organizaĵo kiu estas proksime al la koro de Loes.

La estraro proponas Kees Neeft kiel novan kasiston.

La prezidanto Marc van Oostendorp demisias kaj estas reelektebla. Peter van Noorden ankaŭ demisias kaj estas reelektebla.

Okazis elektoj. La komitato por la elektoj, konsistanta el Ronaldo Nobel kaj Hiddo Velsink, anoncis la rezultojn:

Marc van Oostendorp jes 25 ne 0 sindetenoj 1

Peter van Noorden jes 26 ne 0 sindetenoj 0

Kees Neeft jes 25 ne 0 sindetenoj 1

La prezidanto: ni ĉiam serĉas kandidatojn por la estraro. Se iu interesiĝas, tiu kontaktu unu el ni por la venonta jaro.

Kees Neeft sidiĝis apud la aliaj estraranoj.

(Memorigo pri la estraraj periodoj:

*Marc van Oostendorp 2025-2028 - dua periodo*

*Kees Neeft 2025-2028 - unua periodo*

*Peter van Noorden 2025-2028 - dua periodo*

*Ineke Emmelkamp 2024-2027 - dua periodo*

*Rob Groeneveld 2024-2027 - unua periodo*)

## 9.2. Kaskontrol-komisiono

La kaskontrol-komisiono por la jaro 2024 estis Mariska de Jonge kaj Ans Bakker-ten Hagen. Rezerva membro estis Peter Ebenau. Kiel rezerva membro por la jaro 2025 estis elektita Ronaldo Nobel. La kaskontrol-komisiono por la jaro 2025 konsistas el Mariska de Jonge kaj Peter Ebenau.

## 9.3. Komitatano A ĉe UEA

Kvankam ni provis trovi iun, ni ne havas kandidaton. Ni daŭre serĉas kandidaton.

## 9.4. Elekto de membroj de la Arbitracia Komisiono

La estraro proponis reelekti Anneke Schouten-Buijs kaj Hiddo Velsink kiel membrojn de la Arbitracia Komisiono. La komisiono ricevis 26 voĉdonilojn. Por Anneke estis 26 por, neniuj sindeteno, neniuj kontraŭ, por Hiddo 26 por, neniuj sindeteno, neniuj kontraŭ.

Do, Anneke Schouten-Buijs kaj Hiddo Velsink estis reelektitaj kiel membroj de la Arbitracia Komisiono.

## 10. Fenikso

La prezidanto diris, ke la estraro estas tre kontenta pri la nova redakcio de Fenikso; ĝi estas ĉiufoje tre bela revuo. Paweł Fischer-Kotowski: mi laboras por Fenikso kune kun Thijs van Viegen, kiu hodiaŭ ne povas ĉeesti. Ni nun laboras pri la numero 3. Ĉu estas demandoj?

Ineke: kial vi havas malfruigon?

Paweł: mi transloĝiĝis komence de la jaro kaj havis kelkajn problemojn pro tio.

Ineke: ĉu vi povus indiki en la antaŭparolo kial Fenikso malfruigis? Membroj scivolos kiam aperos Fenikso kaj ne ŝatas se ĝi longe ne aperas.

Iu membro volas scii kiom da homoj legas la retan version de Fenikso. Respondo: tion povus respondi la reta redakcio. Sed post monato Fenikso estas rete alirebla ankaŭ por nemembroj.

## 11. Informado pri diversaj temoj

### 11.1. Kultura tago

Ĉu estas informoj pri la Kultura Tago?

Tiny Droge: jam estas kelkaj informoj en la januara kaj februara numero de Fenikso. Feliĉe ne multe ŝanĝiĝis. La lasta dato por aliĝo estos la 1a de junio. Ni havas kontakton kun la indonezia 'Toko' kiu prizorgos la verspermanĝon en De Sociëteit, la loko kie ni komencos kaj tagmanĝos. La aliĝilo estas en la retejo.

### 11.2. Studosemajnfinoj

La venonta studosemajnfino okazos de la 7a ĝis la 9a de novembro en Krikkenhaar.

An Olijslagers: ni organizos ankaŭ studosemajnfinojn en Belgio, kiu okazos de la 20a ĝis la 22a de februaro 2026.

Ankaŭ nederlandanoj estas bonvenaj. En Svedio oni organizos similan studosemajnfinojn.

### 11.3. Informoj pri la nova retejo de Esperanto Nederland

Ineke: la nova retejo estas preskaŭ preta. Ĉiusemajne grupo kunvenos por pritrakti la retejon.

Bert: kial la agendo en la retejo montras tiom da eventoj?

Ekz-e La Amsterdama Rondo povas enmeti nur tre malgrandan anoncon.

Ineke: preparoligos tiun problemon en la grupo.

Kees: mi havas rimarkon pri la Goslinga-kolekto. Ĝi estas iom fuŝa.

Ineke: ni ordigis ĝin, bitigis kelkajn interesajn objektojn kaj metis ilin en la retejon. La kolekto estas historia tre granda kolekto ĉe UEA, donita al Esperanto Nederland. Por kelkaj homoj ĝi eble estas interesa.

## 12. Jubileantoj

### 12.1. Ni honoras la membrojn kiuj festas sian 50-jaran membrecon

Estas du membroj kiuj festas sian 50-jaran membrecon, nome s-ino Hanny Stam-Ultee kaj s-ro Freek Stam, el Koog aan de Zaan. Ili ricevos jubilean gratuldokumenton.

### 12.2. Ni mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio

Kees Neeft aliĝis antaŭ 25 jaroj al Esperanto Nederland. Ni transdonis al li gratulkarton.

## 13. Premio Verloren van Themaat

La raporto de la ĵurio, prezentita de la prezidanto: La premio Verloren van Themaat estas distingo por homoj kiuj aktivis por altiri atenton al Esperanto en la nederlandaj amaskomunikiloj. Ni ĉiuj scias, kiom grava tio

estas. Neniu eklernas Esperanton tute hazarde, oni devas iel trovi ĝin. En pasintaj jaroj la premio estis aljuĝita al diversaj personoj kiuj kontribuis al tiu celo per plej diversaj rimedoj. Pasintjare ĝi estis aljuĝita al profesoro Gobbo kaj la jaron antaŭe al Foppe-Klaas Hovinga. Sed la ĉi-jare premiitaj estas vere elstaraj. Temas pri du personoj kiuj senĉese sukcesas direkti la publikan atenton al Esperanto, ĉiam en pozitiva kaj kreema maniero: Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer (la kunveno aplaŭdis), en niaj rondoj konataj kiel Kajto. Estas pli da muzikistoj en Esperantujo sed malmultaj uzas sian muzikon tiel konsekvence por disvastigi nian lingvon. Kajto faras tion efike, kantante ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Per tio ili atingas publikon kiu eble neniam aŭdis pri Esperanto kaj tiu publiko malkovras ĝin nature, sen devigo. Ili estis intervjuitaj de la revuo Friesland Post kaj estis reprezentitaj en repaĝoj de la Omrop Fryslân kun klara mencio de Esperanto. Jam dum jardekoj Ankie kaj Nanne ne nur donacis sian muzikan talenton, sed ankaŭ siajn koron kaj animon. Kun profunda respekto por la riĉeco de la frisa kulturo kaj la internacia lingvo ili sukcesis krei ponton inter lokeco kaj tutmondeco, inter tradicio kaj novigo. Sub la nomo Kajto ili prezentas ekde la malfruaj okdekaj jaroj kantojn artismajn kaj samtempe popularajn. Ili enmuzikigis verkojn de granduloj de la Esperanta literaturo Auld, Baghy kaj Thorsen kaj ili revivigis tiujn vortojn per melodioj kiuj tuŝas la koron. Iliaj albumoj, inter kiuj Procesio multkolora, Tohuvabohuo kaj aliaj fariĝis fundamentaj en la Esperanta kantaro. Sed ne nur per koncertoj ili inspiras generaciojn senti sin parto de viva kaj krea komunumo. Ili kreas spacon por kuneco, por partopreno, por vivanta kulturo. Tial kun granda ĝojo kaj profunda dankemo ni hodiaŭ aljuĝas al Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer la Premion Verloren van Themaat. Ili estas veraj pontfarantoj inter lingvoj, kulturoj kaj homoj, elstaraj ambasadoroj de la du veraj internaciaj lingvoj: Esperanto kaj muziko (la kunveno aplaŭdis).

Ankie diris: ni volas danki vin kvin kaj vin ĉiujn pere de kanto. Nanne: ni volas kanti la kanton "Ĉi tiu tago". Ĉi tio estas ege speciala tago, ankaŭ por ni. En la tuta eterneco estas nur unu tago: hodiaŭ. La kanto estis kantita en Esperanto, la frisa, la nederlanda kaj denove en Esperanto. Ankie diris: vi donacis ion al ni, sed mi volas donaci ion al vi: biologiajn semojn.

Nanne diris: ni ne vendas sufiĉe da kompaktdiskoj. Antaŭ la KOVIM-a periodo ni aĉetis multajn kompaktn diskajn

kaj nun ni ne povas vendi ilin. Vi povas preni la diskojn kaj ankaŭ doni ilin al aliaj personoj, ne-esperantistoj. Ĝi estas la KD 'Duope'.

Ankie: ni havas ankoraŭ du koncertojn hodiaŭ, do bedaŭrinde ni devas forlasi vin, sed denove multan dankon, estas granda honoro.

## 14. Ronddemandado

Jos Wichmann: amiko mia estas instruisto en meza lernejo.

Li proponis ke mi venu al lia lernejo foje kaj parolu pri Esperanto. Kiu volas iri kune kun mi?

Marc: tio estos en la proksimeco de Nimego, do mi povos iri kun vi.

Jos: mi skribos al vi.

Katalin Kováts: kiu volas fari ekzamenon en Esperanto?

Marc: ĉu vi povas diri pli?

Katalin: estos pluraj ebloj fari ekzamenon en Esperanto, en 3 aŭ poste en 4 niveloj. Speciala defio estas, trapasi la ekzamenon C2. Pluraj jam faris tion, sed nemultaj nederlandanoj. Marc kaj Paweł kunlaboras por tiu ekzameno. Nun ankaŭ estos konkurso por elekti la plej bonan reganton de Esperanto en unu lando surbaze de la ekzameno C2. Povas gajni la 3 plej bonaj sukcesintoj el tri diversaj landoj. Baldaŭ estos 3000 diplomitoj laŭ la KER-reguloj. Tiun nombron ni povos montri al la ekstera mondo.

Bert: mi havas malnovajn ekzemplerojn de la korespondaj kursoj por la M- kaj S-ekzamenoj de FLE. Kiu interesiĝas pri tiuj?

Katalin: mi interesiĝas.

Iu alia demandis: ĉu Esperanto Nederland daŭrigu la konton en X (antaŭe: Twitter)? La prezidanto: ne.

Rob: kiu volas reprezenti nian asocion dum la Movada Foiro en la UK en Brno? Vi ricevos numerojn de Fenikso kaj alian materialon.

An Olijslagers respondis ke ŝi volas fari tion.

Hiddo sugestis senkoston germanan alternativon por Zoom.

## 15. Fermo

La prezidanto dankis la ĉeestantojn kaj fermis la kunvenon.

*Rob Groeneveld,  
sekretario*

*Zoetermeer, la 11-an de januaro 2026.*

**La sekva jarkunveno okazos sabaton, la 11-an de aprilo 2026 en Utrecht.**



## Tagordo por la 35-a ĝenerala kunveno

Okazonta la 11-an de aprilo 2026 – de la 13.00 h en la ejo  
De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn,  
se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la  
registranto ĉe la komenco de la kunveno.

Agadraporto, financaj raportoj, buĝeto kaj laborplano  
aperos poste en la retejo. Paperajn ekzemplerojn membro  
povos peti de la sekretario post la 1-a de marto 2026.

**Alveno** ekde 13.00 h

1. **Malfermo** de la ĝenerala kunveno je 13.15 h.

Rememoro de la forpasintaj membroj

Nomumi du personojn por la kalkulado de la voĉdonoj.

2. **Fikso de la tagordo**

Estas eble ŝanĝi la tagordon.

3. **Protokolo pri la 34-a ĝenerala kunveno en 2025**

(teksto aperis en Fenikso kaj en la retejo)

4. **Envenintaĵoj**

5. **Komunikoj**

Sub ĉi tiu punkto eblas komuniki ion al la membroj.

6. **Agadraporto pri 2025**

7. **Financa jarraporto pri 2025**

7.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono

7.2. Rezultkonto pri 2025 kun klarigoj

7.3. Bilanco je 31-12-2025

8. **Proponoj**

8.1. Propono de la estraro: fiksi la kotizojn por 2027.

La estraro proponas plialtigi la kotizon por membroj  
pli ol 30-jaraj al €45 jare kaj ne ŝanĝi la kotizon de  
membro ĝis 30-jara (€20) nek la kotizon de  
samhejmano (€15).

8.2. Buĝeto kaj Laborplano por 2027

8.3. Strategia plano 2026 - 2031 ('Beleidsplan')

9. **Elektoj**

9.1. Elekto de estraranoj

9.2. Kaskontrol-komisiono

La kaskontrol-komisiono por la jaro 2025 konsistas el  
Mariska de Jonge kaj Peter Ebenau. Rezerva membro  
estas Ronaldo Nobel. Nova membro por la jaro 2026  
estas serĉata.

9.3. Komitatano A ĉe UEA

Ebla kandidato bonvolu kontakti la estraron.

9.4. Elekto de membroj de la Arbitracia Komisiono

*(Memorigo pri la membroj de la Arbitracia Komisiono:  
Anneke Schouten-Buijs (2025-2028), Hiddo Velsink (2025-  
2028) kaj Johan Swenker (2023-2026)).*

10. **Fenikso**

11. **Informado pri diversaj temoj**

11.1. Kultura tago

11.1.1. 2026 en Veghel

11.1.2. 2027 en Wolvega

11.2. Studosemajnfinoj

12. **Jubileantoj**

12.1. Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran  
membrecon.

12.2. Ni mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al  
la asocio.

13. **Verloren van Themaat-premio**

La ĵurio anoncas la rezulton pri la jaro 2025.

14. **Ronddemandado**

15. **Fermo**

*Rob Groeneveld, sekretario*

*Zoetermeer, la 25-an de januaro 2026.*

## Ed Borsboom (1936–2025)

La 2-an de decembro 2025 forpasis Ed Borsboom, docento pri la germana lingvo kaj longjara prezidanto de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Li estis internacie konata pro movadhistoriaj kontribuadoj, aparte la libroformaj biografioj de Eŭgeno Lanti (*Vivo de Lanti*, 1976) kaj Andreo Cseh (*Vivo de Andreo Cseh*, 2003). Kune kun Herbert Mayer li trovis en la arkivo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno la antaŭe nekonatan manuskripton de Ivan Ŝirjaev – originalan Esperanto-romanon verkitan komence de la 20-a jarcento. Ili sukcesis eldonigi ĝin – *Sen titolo* – en 1995.

Borsboom interesiĝis pri la Esperanta literaturo, gvidis kursojn kaj kontribuis per artikoloj i.a. al *Literatura Foiro* kaj *La Gazeto*. En la jaroj 1995–2019 li prezidis Internacian Esperanto-Instituton en Hago. Pro la biografio de Andreo Cseh li estis distingita en 2004 per la OSIEK-premio.



Bildo: Ziko van Dijk

## Titus Krijgsman (1960–2025)



Titus, kiu estis fidela partoprenanto de niaj studosemajnfinoj, forpasis la 26-an de decembro 2025. Li kutimis veni per trajno, sed kiam antaŭ kelkaj jaroj li malsaniĝis, vojaĝado fariĝis por li multe malpli facila. Sed tamen li faris! Pro la malsano li havis rajton uzi specialan taksion – sed ĉar tiu rajto estis limigita, li “ŝparis” la kilometrojn por povi du fojojn jare veni al Krikkenhaar. Por la lasta fojo li venis en novembro 2025.

En 2020 Titus ricevis premion pro la bela animacia filmo, kiun li faris! Artikolo pri tiu premio aperis en *Fenikso* (1/2021).

Ineke Emmelkamp

### Memore al Titus

La unuan fojon kiam mi ĉeestis studosemajnfinojn en Krikkenhaar, mi ekparolis kun Titus. Li rakontis pri animaciaĵoj, fraktoj, kalkulado ktp. Ĉar mi mem studis matematikon kaj fizikon tuj sparko saltis inter ni.

La lastan fojon kiam mi vidis lin en Krikkenhaar, li suferis multan doloron. Lia kokso estis rompita kaj li uzis fortajn medikamentojn. Li

rakontis ke li bedaŭras ke li ne plu povas malsupreniri la ŝtuparon ĉe La Amsterdama Rondo.


Titus, granda blanka urso, ripozu milde. Mi esperas ke tie, kie vi nun estas, estas multaj bluaj tigretoj por ludi kun vi.

Monique

Ni ĉiuj sciis, ke Titus estas malsana. Dum la antaŭa semajnfino li estis en mia grupo kaj li klopodis sekvi la diskutojn, sed kelkfoje tio evidente postulis multe da energio de li. Mi memoras lin kiel personon kiu ŝatis okupiĝi pri komputilaj aferoj. Li ripozu en paco.

Bert

## Novaj



Constantin Virgil Gheorghiu. *Perahim*.  
Trad. el la rumana Ionel Oneț. Ĝurĉevac:  
DEC, 2025. 162 p.  
ISBN 9789538182228.

Prezo ĉe UEA: € 15 + AVI

Esperanto-leganto povas jam koni la rumanan verkiston Gheorghiu el lia ĉefverko, *La horo 25*, eldonita antaŭ kvar jaroj ĉe Mondial, same en la traduko de la loĝanta en Nederlando Ionel Oneț.

Perahim, la protagonisto de ĉi tiu malpli ampleksa romano, estas eksa gangstero, kiu post dek jaroj da punlaboroj en salminejo sukcesas per bona konduto regajni sian liberecon. Li revenas al la laborista kvartalo de Bukareŝto. Lerninte de la sperto, li decidas tamen komplete ŝanĝi sian vivon. Ne plu la Feĉo, ne plu virinoj, nur la vivo kun la amata patrino kaj vivteno per la lernita en la salminejo metio. Sed la destino obstinas kaj la vivo en kondiĉita libereco evidentiĝas defia. Ĉu oni povas eskapi de la neevitebla? (pfk)



Spomenka Štimec. *Ombro sur interna pejzaĝo*. 2-a eld. Pisa:  
Edistudio, 1996. 142 p. ISBN 8870360199.

Prezo ĉe UEA: € 12 + AVI

Prezo ĉe FEL: € 10 (1-a eld.)

## Viroj kiel ombroj

“Kion vi faros ĉi-vespere?” demandas iu la rakontanton de la romano *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Štimec. Estas preskaŭ la fino de la romano; la virino laboras kiel tradukistino ĉe renkontiĝo, kie oni adiaŭas kelkajn homojn, baldaŭ forvojaĝontaj. Ŝi respondas, ke ŝi deziras verki libron.

- Pri kio?
- Pri kunvivado.
- Do libron pri amo?
- Ne, pri disiĝo.
- Do malĝoja.
- Ne, ne malĝoja.

Ni tamen legas tiun dialogon en libro, por kiu la vorto *malĝoja* ja precize taŭgas: libro, kiu efektive temas pri disiĝo – kvankam rakontoj pri disiĝo estas preskaŭ ĉiam ankaŭ rakontoj pri amo. La viro, kun kiu la rakontantino de la romano kunvivis dum kelkaj jaroj, foriris – eble por daŭrigi kun alia, eble por trovi tiun alian.

Komence de la libro, la rakontantino estas postlasita en ilia komuna domo, kaj ĉio ajn en tiu domo memorigas al ŝi pri li, ĉar li preskaŭ ĉion lasis tie. Sekvas cent paĝoj da malespera am doloro, priskribita en tute neimitebla maniero: por mi *Ombro sur interna pejzaĝo* estas

ĉefverko de nia literaturo. La rakontantino faras ĉion por forgesi la viron: ŝi ekrilatas mallonge kun aliaj viroj, kiuj tamen ĉiam denove memorigas ŝin pri li, pri Jan.

La viroj, ankaŭ Jan, estas en ĉio ĉi nur ombroj (sur la interna pejzaĝo de la rakontantino). Oni ekscias fakte tre malmulte pri ili: kiuj ili estas precize, kion ili faras, kiel ili aspektas. Esence la virino estas tute sola, eĉ kiam ŝi estas kun viro; ŝin akompanas maksimume de tempo al tempo "voĉo", kiu kritike alparolas ŝin. Aŭdi tian voĉon ja nur malofte estas signo, ke oni fartas bone.

Nepretervidebla dimensio estas, ke temas pri internacia rilato, kaj eĉ pri rilato en la medio de esperantistoj. Ni ne scias precize, de kie Jan devenas, sed verŝajne el Okcidenta Germanio: granda lando en la okcidento; dum la rakontantino devenas el malgranda lando de la orienta bloko (Ŝtimec mem estas el Kroatujo, kaj en la libro aperas unu kroata frazeto). Tio signifas, ke ili devis havi longdistancon rilaton, aŭ ke unu el ili devis loĝi en la lando de la alia. Ĉiuj tri eblecoj efektive aperas. Temas ankaŭ pri periodo, la okdekaj jaroj de la antaŭa jarcento, en kiu tio estis eĉ pli malfacile ol nun, la tempo de komunismo kiam estis pli malfacile vojaĝi, aŭ uzi orientlandan monon en la okcidento.

Aldoniĝas, ke pere de Esperanto la geamantoj estas kvazaŭ enfermitaj en ankoraŭ pli malgranda medio. La rakontantino ekzemple ne volas paroli la lingvon de la lando de Jan; restas neklare, ĉu li kapablas fari tion en ŝia lingvo. Oni mencias revuojn kaj librojn en Esperanto

(*Monato*, la revuo *Esperanto*), sed la rakontantino iam konfesas, ke ŝi ne havas tempon legi poemojn en sia gepatra lingvo. La Esperanto-movado en Eŭropo en la okdekaj jaroj havis kulture vivon, sed ĝi ankaŭ estis malgranda.

Ĉio ĉi kondukas al ankoraŭ pli granda soleco. Aliaj esperantistoj estas oniaj plej bonaj amikoj, sed oni vidas ilin maksimume unufoje jare, dum kongreso. Ankaŭ la unua "anstataŭa amiko" de la rakontantino devenas el tiu malgranda mondeto: li estas edziĝinta, sed laŭ peto de la rakontantino li venas stari ĉe ŝi – kaj en ŝia lito – dum kelkaj tagoj. Ambaŭ trompas unu la alian kaj aliajn – li estas edziĝinta, ŝi ankoraŭ funebras pro Jan – sed la rilato ne estas komplika, ĉar li rapide denove foriras, al alia lando. Ŝia psika stato, male, fariĝas ne malpli komplika. Nur la lasta amiko, Giorgio, kun kiu ŝi ne parolas Esperanton sed la francan, travidas la aferon: ŝi ne kapablas ami iun ajn post Jan. Ŝi bezonas tiun paŝon ekster la malgrandan esperantistan medion por pli bone kompreni sin.

Tre lerte Ŝtimec teksas diversajn temojn tra la libro. Ombroj kaj pejzaĝoj konstante reaperas. Ŝi ja multe vojaĝas, dank' al sia internacia reto, sed la pejzaĝoj plejofte nur glitas preter ŝi. Kaj la homoj restas ombroj en tiu ĉi eta majstroverko de la Esperanta literaturo.

*Ombro sur interna pejzaĝo* estas senpage aŭskultebla kiel aŭdlibro ĉe <https://mallonge.net/ombro>.

Marc van Oostendorp

## CO tamen (ankoraŭ) ne vendita

En la antaŭa numero de *Fenikso* ni informis pri la vendo de la domo en kiu troviĝas la Centra Oficejo de UEA, ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo. Fine de januaro la estraro de UEA sciigis, ke tiu vendo ankoraŭ ne definitivegis. La privata interesiĝanto decidis ne aĉeti la konstruaĵon propranome, sed pere de pli granda investokompanio. Tio influas la formalizaĵojn kaj UEA ne ekskludas ankoraŭ la eblon vendi la domon al iu alia. La nuna intenco estas forlasi la domon ĝis la fino de majo 2026. Siavice, la anonco en la maklerista retejo Funda pendas daŭre kiel aktuala.

Bildo: Wikipedia (Joost Witteveen)





Benata Hengstmengel-Koopmans  
✉ [benata@zonnet.nl](mailto:benata@zonnet.nl)

Revuo-interŝanĝo estas projekto por prezenti enhavon de aliaj revuoj.

## Kontakto

n-ro 324 (3/2025)

Temas pri la lasta numero sub redaktado de Karina Oliveira el Brazilo/Finnlando; kiel nova redaktoro (ekde la sekva numero) prezentas sin Thiago B. Assumpção el São Paulo, Brazilo.



Sur la kovrilpaĝo: *Legado estas tre grava afero en mia vivo.* Temas pri longa artikolo de Karina Oliveira pri la libroj kiujn ŝi legis en la jaroj 2023–2025.

Alessio Giordano el Svislando/Italio pri drogoj: *La papusoj de la popoloj.*

Ni legas ankaŭ mallongan gvidilon de Gabriele Esposito Guido: *Dum IJF 2025... aŭ Kiel organizi esperantistan festivalon.*

Fine aperas anonco: *JES revenas al Germanio.*



## Monato

aŭgusto-septembro 2025 (n-ro 8–9/2025, 46-a jarkolekto)

Sur la kovrilpaĝo: *Inteligente uzi AI; Video-ludo akcelas vojaĝadon; Germanio: ĉu plenumiĝos la individuaj esperoj?* Kiel daŭrigo de sia artikolo en la antaŭa numero de Monato, Bert de Wit opinias: *Wilders fuĝas de respondeco.* Alia politika artikolo temas pri Leono la 14-a: *Spirita gvidanto kun perua koro.* Pri tio skribas Gustavo Villanueva Chávez el Peruo.

Artikolo pri neŭrologio en la rubriko "Lingvo". La aŭtoro asertas ke *multlingveco malhelpas progreson de demenco.* El diplomatia vidpunkto aperas analizo, ke Ĉinio kaj CELAC (= Latin-amerikaj kaj karibaj ŝtatoj) plifortigas sian kunlaboron.

## La Revuo Orienta

n-ro 1232 (7/2025), 106-a jaro

Sur la kovrilpaĝo: *Alten al la pinto strebu nun la junuloj!* – temas pri diversaj gejunuloj sur la pinto de Kilimanĝaro. La studento Takahashi Mizuki el Tokio skribas pri *Sukcesa laborserĉado dank' al Esperanto.*

En la fino Komaki Tokiko montras tradukojn kaj desegnojn pri japanlingvaj mangaoj. Temas pri ŝiaj spertoj pri lingvolernado, kiuj rilatas al la Esperanto-ekzameno de JEI. Cetere la revuo estas preskaŭ tute japanlingva.

## Sennaciulo

januaro-marto 2025 (n-ro 1-3/2025 = 1435–1437)


Sur la kovrilpaĝo: pentraĵo de Eugène Laermans *Landverhuizers* (La enmigrintoj). Roland Platteau reagas al la enmigro de flandraj laboristoj en la nordo de Francujo.

Aliaj artikoloj:

- pri eŭropa paca projekto; pri Esperanto kiel naskohelpanto de Ĉina Komunista Partio;
- pri aranĝoj en Greziljono, Esperanta Kulturdomo;
- *kiel kuraci nian malsanan movadon*, pledo por la rehabilitado de la Zamenhofa interna ideo.
- Cetere multaj tradukitaj artikoloj.

## Kien iris la atestanto?


Okazis enrompo en juvelvendejo. Kompreneble la friponoj jam fuĝis, kiam la polico alvenas. Restas nur signoj en la neĝtavolo: tiuj de aŭto kaj de biciklo.



La unua penso estas sekvi la aŭtajn signojn, sed ili estas svagaj kaj apenaŭ uzeblaj pro la daŭre falanta neĝo. La biciklaj signoj, tamen, estas ankoraŭ klare videblaj, do pli freŝaj. La biciklanto povus esti grava atestanto. Necesas paroli kun li aŭ ŝi. La ĉefa demando estas:

### Kien tiu biciklanto iris?

Jen la samaj signoj, nun koloritaj.




Farendaj paŝoj:

1. Determinu kiu signo apartenas al la malantaŭa rado.
2. Elektu hazarde punkton tie. Nomu ĝin A.
3. Desegnu la tanĝanton en A. Tiu tanĝanto ĉiam tranĉas la spuron de la antaŭa rado en du punktoj: unu maldekstre (B) kaj unu dekstre (C).
4. Mezuru AB kaj AC.
5. Ripetu tion por, ni diru, kvar malsamaj punktoj, kaj tabeligu la rezultojn.
6. Komparu la distancojn AB inter si kaj la distancojn AC inter si. Ĉu ili estas la samaj?
7. Por unu el tiuj du serioj, la distancoj estas proksimume egalaj.

Tio montras la serĉatan direkton.


Konkrete en ĉi tiu kazo:

La antaŭa rado stiras, dum la malantaŭa rado estas fiksita. La antaŭa rado zigzagas pli.



Elektu punkton A (2), trovu la punktojn B kaj C (3), mezuru:  $AB = 0,3$  cm;  $AC = 0,8$  cm (4)

Preferindas elekti la punktojn A sufiĉe proksime al la pintoj de la zigzagoj; tiel la mezuradoj de AB kaj AC estos pli precizaj.



Ripeto (5) kaj tabeligo (6)

AB	0,4	0,6	0,2	0,5
AC	0,8	0,8	0,8	0,8

→ serio AB: ne la samaj

→ serio AC: proksimume la samaj

### Konkludo

La antaŭa rado troviĝas **dekstre** de la malantaŭa rado – la atestanto iris **dekstren**.

Se vi konas la skalon de la foto, eblas ankaŭ kalkuli la distancon inter la radoj.

*Harm Voortman*

Trovu la Esperantajn tradukojn de la sekvaj nederlandaj vortoj en la suba tabelo. Vi trovas la unuan literon de la traduko post la nederlanda vorto. La trovendaj vortoj estas:

ambulance - a	consult - k	opereren - o	verpleging - f
aderen - v	farmaceuten - f	polikliniek - p	verkouden - m
apotheker - a	genezen - r	pijnloos - s	watten - v
arts - k	heilzaam - b	rolstoel - r	wond - v
bacteriën - b	immuun - i	röntgenfoto - r	ziekenhuis - m
besmettelijk - k	koorts - f	stethoscoop - s	
bloeddruk - s	krukken - l	symptomen - s	
brancard - b	lijden - s	thermometer - t	
bijwerking - k	medicijnen - m	verband - b	

La solvo de la enigmo en la antaŭa numero de *Fenikso* (n-ro 5-6/2025) estas:

**"Mi iom provokis vin".**

La ĝustan solvon sendis

**Jessie van Loon kaj Koos Scharroo.**

La ludo estas kreita de Det Koning.

Sendu vian solvon al

✉ [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)

I	O	S	O	Ĝ	E	S	L	U	R	B	A	N	D	A	Ĝ	O
M	I	R	U	I	A	L	S	A	R	O	L	O	D	N	E	S
L	A	C	B	F	Ĝ	N	O	K	R	O	M	E	F	I	K	O
V	A	E	A	E	E	I	O	R	T	E	M	O	M	R	E	T
V	N	M	A	R	F	R	N	V	E	J	N	O	J	S	M	M
A	A	O	B	A	E	A	I	A	O	R	M	K	F	A	A	E
P	P	T	I	A	M	P	R	M	S	A	I	I	L	K	L	D
B	K	O	O	S	S	B	O	M	R	E	B	N	E	U	S	I
A	O	D	T	J	N	T	U	G	A	R	R	I	G	R	A	K
K	N	N	D	E	P	E	O	L	A	C	E	L	A	A	N	A
T	S	U	E	M	K	N	T	N	A	K	I	K	D	C	U	M
E	U	V	I	F	E	I	K	G	O	N	F	I	O	I	L	E
R	L	S	O	G	I	A	S	N	N	J	C	L	S	S	E	N
I	T	R	T	M	R	K	T	T	I	A	R	O	A	T	J	T
O	O	N	U	D	S	A	A	R	O	I	S	P	G	O	O	O
J	E	N	O	I	Ĝ	S	T	E	T	O	S	K	O	P	O	J
R	A	D	E	A	T	N	I	M	U	M	R	A	V	L	A	M

## Esperanta Vadekskurso al Ameland la 7-an de junio 2026

Ĉu vi havas bonan korpostaton? Kunpromenu al Ameland! Foppe-Klaas Hovinga kaj Harm Voortman proponas komunan vad-marŝadon (*wadlooptocht*) al Ameland. Ĉiu estas bonvena! Se vi ne povas aŭ ne volas promeni, venu per pramo kaj ni renkontiĝu en Nes, kie ni kune manĝos kaj trinkos.

Se vi volas piedmarŝi al Ameland kun la Esperanta grupo: ni renkontiĝu la **7-an de junio 2026** je **6h00** apud la restoracio *Land- en Zeezicht*, Grandyk 2, Holwerd. Se vi venas trajne kaj buse, necesas, ke vi estu tie jam la antaŭan vesperon – ni helpos al vi trovi tranoktejon.

La nepromenemuloj: prenu la pramon, kiu ekiras je **9h45** (alveno al Nes ĉ. 10h35) kaj atendu tie la promenantojn. Vespere ni ĉiuj revenos per la antaŭlasta pramo, kiu ekiras je 17h15.

Pliaj informoj kaj aliĝilo en la retejo de Esperanto Nederland: [esperanto-nederland.nl](https://esperanto-nederland.nl). Tie vi trovos ankaŭ indikojn pri tio, kiel vi povas pretiĝi, kion kunporti kaj je kiuj kostoj pretiĝi.

## Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee.

Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zo veel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview

houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op. Stuur je bijdrage naar:

✉ [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)



## La Komencinto

*Teksto kaj desegnoj: Thijs van Viegen*



# Studieweekend tijdens Pinksterweekend

Tijdens de Pinksterendagen kun je van **22 t/m 24 mei 2026** deelnemen aan het studieweekend. De kosten zijn € 105 voor leden van Esperanto Nederland, NEJ of een andere landelijke Esperanto-organisatie. Anderen betalen € 115. In de prijs zijn inbegrepen: lessen, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee. Meer informatie en aanmeldingsformulier:

 [esperanto-nederland.nl/studieweekend](https://esperanto-nederland.nl/studieweekend).

De docenten zijn Federico Gobbo, Piet Glorieux, Frank van Hertrooij, Bert de Wit en Rob Groeneveld.

**Subsidie mogelijk.** Wil je graag deelnemen, maar is het te duur voor jou? Jongeren uit Nederland kunnen van Esperanto Nederland een tegemoetkoming in de kosten krijgen. Stuur je verzoek om subsidie naar de organisatoren van het studieweekend.

**Iets meer luxe?** Wil je tijdens het studieweekend meer privacy? Een eigen slaapkamer? Denk dan eens aan het tweede huisje dat op het terrein staat. Het huisje heet 'Op den Haar'. Er zijn twee slaapkamers. Als je dit iets lijkt neem dan rechtstreeks contact op met de beheerder van Krikkenhaar.

Als je wilt **kamperen**, neem dan contact op met de beheerder van Krikkenhaar. en als het lukt, laat het mij dan weten.

## Tweede pinksterdag

Maandag 25 mei is voor veel mensen een vrije dag. Wil je dan ook in Krikkenhaar blijven? De extra nacht kun je zelf regelen met de beheerder van het gebouw. Ook de betaling regel je rechtstreeks. In het gebouw Krikkenhaar kun je zelf koken in de grote keuken. Er zijn inductiekookplaten, koelkasten, potten, pannen, borden. Na het einde van het leerzame studieweekend kun je op zondagavond lekker nagenieten. Arjen-Sjoerd en Ineke blijven in ieder geval deze extra dag!

Je kunt ook gebruik maken van een kamer in het Krikske, tegen gereduceerd tarief. Er zijn daar drie slaapkamers (met elk twee bedden). Neem contact op met Ineke.

Even voor de duidelijkheid: de extra nacht in het hoofdgebouw of in Op den Haar regel je zelf. Dit gaat niet via Esperanto Nederland.

## November 2026

Kun je niet tijdens de pinksterdagen? We hebben al een nieuwe datum. Op 6, 7 en 8 november 2026. Noteer alvast deze datum. Je kunt je hiervoor aanmelden na 25 mei 2026.

Tot ziens in Krikkenhaar,

*Lilian, Arjen-Sjoerd en Ineke*

✉ [studosemajfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajfino@esperanto-nederland.nl)



PostNL  
Port Betaald  
Port Payé  
Pays-Bas

Fenikso  
Jarkolekto 31, n-ro 1  
Januaro - Februaro 2026